***Valamo monaĥejo, Heinävesi, Finnlando***

# POR RESPEKTI LA ETOSON DE LA MONAĤEJO

***Tre estimata kursano.***

Monaĥejo estas loko de silentado kaj pilgrimado kaj sankta loko por ortodoksoj. Tial bonvolu:

- kovri viajn genuojn kaj ŝultrojn, almenaŭ enirante preĝejon
- ne fumi kaj fari nenecesan bruon
- respekti silenton inter la 21-a kaj 6-a horoj
- ne porti kun vi hejmbestojn al la monaĥejo
- ne foti la monaĥo-fratojn sen peti permeson de ili
- ne foti en preĝejoj kaj en muzeo
- malŝalti vian poŝtelefonon enirante preĝejon
- ne sunumi aŭ bani ĉe la lagobordo de la monaĥejo
- lasi vian aŭton en la indikita parkejo

Fumado estas permesita en la monaĥeja areo nur en la aparte indikita loko malantaŭ la akcepteja konstruaĵo.

Naĝado estas permesita nur ekster la monaĥeja areo trans la ponto maldekstren.

La monaĥejo bonvenigas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri la ortodoksa eklezio kaj kredo. Ne-ortodokso vi rajtas partopreni ĉiujn diservojn kaj ceremoniojn krom la Sanktan Komunion dum liturgio, eniri kaj eliri kiam ajn vi volas. Krome vi rajtas aĉeti kandelojn en preĝejo, porti ilin ĉe ikonojn, preĝi, fari krucsignon kaj kisi ikonojn.

Se vi havas demandojn pri la ortodoksismo, vi ĉiam rajtas turni vin al la personaro. Kaj se vi volas havi spiritajn konsilojn, vi povas peti diskuton kun pastro-fratoj (kiuj portas krucon sur sia brusto).
Se vi volas ricevi benadon por via ikono, vi povas lasi ĝin antaŭ diservo al la pedelo, kiu vendas kandelojn en la preĝejo kaj preni ĝin post la diservo.

En sekvaj paĝoj vi trovos pliajn konsilojn pri: ***Kiel konduti en ortodoksa preĝejo***

Bonvenon en la monaĥeja areo kaj en la Esperantokurso!

***Esperanto-Asocio de Finnlando kunlabore kun Popola Instituto de Valamo***

***Kiel konduti en ortodoksa preĝejo***

*Multaj homoj hezitas eniri ortodoksan preĝejon, ĉar ili timas, ke ili ne kondutas ĝuste tie. La kono de ekleziaj kutimoj aŭ velkiĝis aŭ mankas. Tamen eble multaj volus eniri, se ili nur povus stari en angulo sen esti rimarkitaj aŭ observataj. En Finnlando tio malofte eblas, ĉar preĝejoj preskaŭ neniam estas tiel plenaj, ke unuopa homo povus sin kaŝi en la amaso. Aliflanke ege maloftaj estas la okazoj, ke neortodokso pro nescio ofendis ortodoksojn per sia konduto.*

***Ĉu sidi aŭ stari?***

*Tradicie viroj staras en la preĝejo dekstre rigardite de la pordo kaj virinoj maldekstre. Tiu regulo ne estas senescepta, kaj oni rajtas elekti la lokon kie oni plej bone sentas sin. Tamen oni volonte ne restu tro proksime ĉe la pordo, por ke oni ne malfaciligu la eniron de pli poste venantaj. Se oni ne toleras staradon dum la tuta diservo, oni rajtas portempe sidi, sed oni almenaŭ staru dum la legado de evangelio. La kutimo stari en diservo devenas de la tradicio respekti Dion starante antaŭ Li. En ortodoksaj preĝejoj de Grekio kaj pluraj balkanaj landoj oni ekkutimis post la dua mondmilito havi benkojn aŭ seĝojn, kio estas romkatolika influo. Ankaŭ en tiuj preĝejoj oni staras portempe, sed la popolo scias tre precize kiam sidi kaj kiam stari. La ĉefa regulo ĉiuokaze estas, ke neniu restu for de diservo pro tio, ke ne toleras staradon.*

***Krucsigno kaj kandeloj antaŭ ikonoj***

*Ortodokso ĉiam faras krucsignon enirante preĝejon. La kutimo devenas de la komenca periodo de kristanismo kaj krucsigno estas jam preĝo en si mem. Ankaŭ neortodoksoj rajtas fari krucsignon.*

*Ortodoksoj faras krucsignon kunmetante la tri unuajn fingrojn de la dekstra mano kaj premante la du restantajn kontraŭ la polmo, kaj poste tuŝante per la kunigitaj fingroj sian frunton, bruston, dekstran kaj maldekstran ŝultron. Tiel oni formas sur si krucon, la venkosignon de Kristo, antaŭ kiu la fortoj de malbono retiras sin.*

*Kiu ajn rajtas aĉeti ĉe la pedela tablo kandelojn, kies prezoj varias laŭ la grandeco. La kandelojn oni kutimas bruligi sur kandelingoj antaŭ diversaj ikonoj. Ekbruligante kandelon oni kutimas silente preĝi, aŭ propravorte aŭ laŭ vortoj lernitaj. Ekz. antaŭ la ikono de Savanto oni povas diri: ”Sinjoro Jesuo Kristo, Filo de Dio, indulgu min, pekanton”. Antaŭ la ikono de Dipatrino: ”La plej sankta Dinaskinto, preĝu vian*

*Filon por mi". Antaŭ la memorada tablo: "Konduku, Sinjoro al ripozo vian servinton (antaŭnomo)." La memorada tablo situas en preĝejo antaŭ la tn. Golgata-ikono (kutime maldekstre de la altaro, priskribas la krucumitan Kriston kun Dipatrino kaj apostolo Johano).*

*Oni kompreneble povas preĝi Dion kie ajn. Li ĉiam estas proksime kaj aŭdas niajn preĝojn, sed estas pli facile koncentri niajn disemajn pensojn, se ni ekz. povas rigardi ikonon.*

*Ikono ĉiam situas centre en ortodoksa hejmo. Laŭ rusa tradicio oni pendigas ĝin en la angulo de la ĉefa ĉambro kontraŭ la enira pordo, por ke la eniranto unue vidu ĝin. Laŭ greka kutimo oni pendigas ikonon sur muro, sed neniam kiel pentraĵo inter aliaj, ĉar ĝia aparta valoro devas esti videbla laŭ la maniero pendigi ĝin.*

## *Preĝopetoj*

*Se iu volas, ke oni memoradu dum la diservo sian malsanan aŭ forpasintan proksimulon, oni plenigu ĉe la pedela tablo slipeton, kiu enhavas la vortojn "Malsana servanto de Dio (antaŭnomo)" aŭ "Konduku, Sinjoro, al ripozo vian servinton (antaŭnomo)". La pedelo portos la slipeton en la altaron al la pastro. Haveblaj estas ankaŭ tn. memorlibretoj, en kiujn oni povas skribi nomojn de personoj, por kiuj oni petas preĝojn de la eklezio.*

## *Ĉu kanti aŭ ne*

*Kutime koruso prizorgas en la preĝejo pri la kantado. Tamen plurloke la publiko komune kantas certajn ofte ripetatajn kantojn; el ili eble la plej kutima estas konfeso de la kredo dum liturgio. La kantoro donas tiam indikon al la publiko, ke ĝi povas kunkanti. Sen tiu indiko oni tamen ne kantu.*

## *Eŭkaristio (La Sankta Komunio)*

*Ĉiu liturgio (dimanĉ- aŭ fest-matena diservo) inkluzivas senescepte eŭkaristion, kiu estas permesata nur por baptitaj membroj de ortodoksa eklezio (ĉeesti ja rajtas ĉiuj). La eklezio vokas ĉiun sian membron por partopreni la misteron de la korpo kaj sango de Kristo kondiĉe, ke li/ŝi prepariĝis por tio. Al la prepariĝo apartenas preĝado kaj fastado. Fastado ĉi tie signifas, ke oni nenion trinkas kaj manĝas dum certa tempo antaŭ la eŭkaristio; detenante sin pri korpa nutraĵo oni donas preferon al la spirita nutraĵo. Infanoj sub lerneja aĝo ne fastas, sed komencas tion fari iom post iom kiam ili lernas kompreni la signifon de fastado.*

*Kiam la pastro portas la sanktajn donacojn dum la tn. Granda procesio de sur la ofertablo, flanke de la altaro tra la preĝeja salono al la sankta tablo kaj diras: ”Nia Sinjoro Dio memoru en sia regno vin kaj ĉiujn ortodoksajn kristanojn kaj ĉiujn kristanojn …”, tiam ortodoksoj, kiuj intencas partopreni eŭkaristion, kolektiĝas en la antaŭa parto de la preĝejo kaj sin klinas antaŭ la sanktaj donacoj.*

*Post benado de la sanktaj donacoj la pastro kliniĝas ĝis la planko, kiel ankaŭ faras la preĝantoj, ĉar la pastro ne sola estas la efektiviganto de liturgio kaj la aliaj nur rigardantoj; la tuta ĉeestanta eklezia publiko efektivigas kun la pastro la sanktan diservon. Ĉiu preĝanto estas grava parto de tio.*

*Kiam la pastro tretas antaŭ la publikon kun la kaliko kaj diras: ”Bonvolu alproksimiĝi en timo por Dio, kredo kaj amo”, tiam plej laste ĉiu, kiu volas partopreni la eŭkaristion, devas veni antaŭen. Kun la pastro ĉiuj kune preĝas kaj post tio kliniĝas ĝis la planko por montri sian humilecon kaj respekton antaŭ la sankta mistero de Dio (escepto estas la tempo ekde pasko ĝis pentekosto, kiam por indiki spiritan ĝojon oni ne kliniĝas ĝis planko). Laŭvice ortodoksoj iras al la pastro kun manbrakoj kruce metitaj sur la brusto. La pastro donas eŭkaristion al ĉies buŝo dirante ”Pri la korpo kaj sango de nia Sinjoro kaj Savanto Kristo partoprenas servanto de Dio (antaŭnomo) por sanigo de sia animo kaj korpo kaj por eterna vivo.” Poste oni kisas la kalikon kiel la flankon de Kristo, el kiu sur kruco elfluis Lia sango.*

*Al la ortodoksa eŭkaristio apartenas ankaŭ tn. posta vino kaj pano. Tuj post ricevi la eŭkaristion ortodoksoj iras al flanka tablo, kie oni ricevas vinon miksitan kun varma akvo kaj panpecon, tn. antidora. Tiu tradicio devenas de la tn. ammanĝoj, kiujn la fruaj kristanoj kutimis havi dum tutnoktaj diservoj, kiam ĉiu portis ion por komune trinki kaj manĝi. Post antidora la partoprenintoj gratulas unu la alian pro la granda mistero de Kristo. Kiam la pastro ankoraŭfoje venas el la altaro kun la kaliko kaj diras: ”Savu, Sinjoro vian popolon kaj benu vian heredaĵon”, ĉiuj kolektiĝas antaŭ li kaj klinas sian kapon, ĉar tiel oni memorigas nin pri la dua alveno de Kristo, pro kio ni devas vekiĝi.*

*En la fino de liturgio ĉiuj ankoraŭ iras por kisi krucon, kiun la pastro tenas en siaj manoj kaj ofte oni ankoraŭ disdonas panpecojn por montri, ke neniu devu foriri sen sia parto de la festo de Sinjoro. Ankaŭ tiuj, kiuj ne partoprenis eŭkaristion kaj neortodoksoj rajtas kisi la krucon kaj preni panpecon, kiu ne apartenas al la ekaristio.*

*Forirante la preĝejon ortodoksoj laste turnas sin al la altaro kaj faras krucsignon.*